Temas pri la dua eldono de la traduko en Esperanton fare de Armand Caumont el la jaro 1914, lingve reviziita per kolektivo de esperantistoj, gvidata de Franko Luin en 2001, envicigita en la renomana serion de UEA "Oriento-Okcidento". Ĉar mi dum la preparo de la eldono konatiĝis pli proksime kun la intereseĝaj vivo, verko kaj pacagado de Bertha von Suttner, kaj krome eksciis, kiel malmulte konata ŝi estas al la hodiaŭaj, eĉ edukitaj homoj, mi verkis aldone la libron



"Sen laco por paco", kun la subtitolo "Vivo kaj verko de Bertha von Suttner". Ĝi sufiĉe detale priskribas ne nur ŝiajn vivon kaj verkon, kion promesas la subtitolo, sed ankaŭ la tensioplanan politikan situacion kaj pacmovadon en Eŭropo (kaj iom ankaŭ tutmonde) dum lastaj jardekoj de la 19-a jarcento.

Mi forte esperas, ke tiuj du libroj de kaj pri Bertha von Suttner trovos siajn legantojn, la pacon subtenantajn esperantistojn, kiujn la verkoj pensigos ne nur pri la historiaj eventoj, sed ankaŭ pri multaj paraleloj kun la nuntempa situacio en la mondo.

Aldonendas, ke Bertha von Suttner ne estas ununura aŭstria Nobel-premiito pri paco, kiun ŝi ricevis en la jaro 1905. En la jaro 1911 ĝi estis aljuĝita al ŝia plej proksima kunlaboranto, la aŭstria juda ĵurnalisto kaj pacisto Alfred Hermann Fried, al kiu estas dediĉita en la verko pri Bertha von Suttner unu el la tri aldonaĵoj. La ceteraj du pritraktas la ĉeĥan familion Kinsky, de kiu devenas Bertha, kaj ŝian proksiman amikon kaj subtenanton Alfred Nobel.

Pli da informoj pri la menciitaj libroj, kaj ankaŭ pri la ceteraj eldonaĵoj de KAVA-PECH por esperantistoj, vi trovos ĉe <https://kava-pech.cz/esperanto>.

Petro Chrdle, [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

## Ĉu diverskvalitaj lingvoj?

**Estas unu el la kromefikoj de nia kleriga sistemo, ke ni alte taksas la valoron de literaturo.**

Jam en la baza lernejo oni instruas al ni konscian kaj laŭeble lertan lingvouzon. Ni lernas strukturigi rakontojn, eviti vort-ripetojn, apliki la bazajn regulojn, por fine atingi bonstilajn tekstojn. Jam frue oni konigas al ni la verkojn de la plej gravaj aŭtoroj de nia lingvo, kiuj havas por ni la rangon de naciaj herooj. Baldaŭ ni ekscias, ke ekzistas tiaj ankaŭ en aliaj lingvoj, kaj paŝon post paŝo en nia menso formiĝas hierarkio, en kiu tiuj lingvoj, pri kies literaturo ni ricevis multe da informoj, troviĝas plej supre. Male, lingvojn sen fama literaturo ni komencas taksati malpli valoraj. Kompreneble tio estas sensencaĵo, sed tiun trukon produktas nia cerbo senkonscie kaj kvazaŭ aŭtomate.

## Ĉu tamen diverskvalitaj lingvoj?

Lingvoj estas pli ol nuraj iloj por komunikado. Ili estas kompleksaj sistemoj, kiuj ebligas al ni klare pensi kaj doni strukturon al la mondo. Kaj en tio ili fojfoje konsiderinde diferencas. La plejmulto de la homoj sur la mondo ne regas pli ol du lingvojn. Ĉiuj aliaj lingvoj daŭre restas enigmaj al ni.

Tradukoj de literaturaj verkoj estas kvazaŭ fenestroj de unu lingvo al alia. Ili ebligas komune ĝui la kulturajn riĉaĵojn de diversaj

nacioj. Kaj denove minacas la jam konata kaptilo: Ju pli da tradukoj el iu lingvo, des pli ĝi estas valora? Kompreneble ne! Sed almenaŭ tio validas: La bona kono de alia kulturo pere de nombraj literaturaj tradukoj lasas ĝin ŝajni malpli fremda.

## Kio pri Esperanto?

Esperanto estas bona lingvo, diris Claude Piron, kaj li pravis. Sed tion scias nur homoj, kiuj parolas ĝin. Al la aliaj Esperanto eĉ estas pli fremda ol ĉiu nekonata nacia lingvo, ĉar nur elpenaĵo de iu stranga ulo, malnatura teknikaĵo, iu kunkudrita „Frankenŝtejna monstro“. Kaj neniu iam aŭdis pri Esperanto-literaturo. Oni povus kredi, ke tia ne ekzistas – verŝajne ja ne eblas... Por Esperanto la tradukado de originala literaturo al naciaj lingvoj duoble benefikas: Unue ĝi pruvas, ke Esperanto havas kulturon kaj estas egalvalora al aliaj lingvoj, kaj due ĝi forvaporigas la senfundan, sed forte enradikiĝintan antaŭjuĝon, ke en „artefarita lingvo“ ne eblas „esprimi emociojn“. Mi do forte konsilas pli vastan tradukan laboron, por fari videbla la imponan originalan literaturon por la ne-Esperanta publiko, kaj tiel faciligi ties alproksimiĝon al Esperanto.

Christian Cimpă





## PSI 2020 in der Lutherstadt Wittenberg

Vom 6. - 13. April 2020 wird die 36.  
Internationale Frühlingswoche (PSI)  
in der Lutherstadt Wittenberg stattfinden

**D**as kulturelle Angebot in dieser Region ist ausgezeichnet - es wird deshalb 2020 erstmalig Thementage geben. Während eines solchen Thementages kann man sich in vormittäglichen Vorträgen auf die Ziele der nachmittäglichen Ausflüge vorbereiten. Geplant sind derzeit ein Wittenberg-Tag, ein Bauhaus-Tag (Dessau), ein Wörlitz-Tag und - nicht regionsbezogen - ein FridaysForFuture-Tag mit ökologischen Themen.

Ansonsten wird das PSI wie üblich ablaufen: vormittags Esperanto-Kurse für Anfänger und Fortgeschrittene, daneben Vorträge, Handwerkliches und Sport. Der Nachmittag ist für Ausflüge vorgesehen - hier gibt es meist 2-3 Angebote parallel -, und der Abend ist der Kultur gewidmet. Wie immer wird ein Ball stattfinden, das Thema dazu ist - wie nicht anders zu erwarten - das Mittelalter. Am Ostersonntag findet das traditionelle Ostereiersuchen statt, am Abend davor ist der Besuch einer Ostermesse möglich. Gelegenheiten zum gemütlichen Beisammensein, Klönen und Spielen sind wie immer während der ganzen PSI-Woche gegeben.

Wir werden in der Schlossjugendherberge Wittenberg untergebracht sein in direkter Nachbarschaft zur Schlosskirche, an deren Hauptportal Martin Luther am 31. Oktober 1517 seine 95 Thesen angeschlagen hat. Die Jugendherberge Wittenberg ist Teil des Schlosskomplexes der ehemaligen Residenz Friedrichs des Weisen.

Weitere Details finden sich unter <https://psi.esperanto.de>, dort ist auch die elektronische Anmeldung möglich.

Die erste Anmeldeperiode endet am 4. Januar 2020, die zweite am 31. Januar 2020 und die dritte am 29. Februar 2020. Durch frühzeitige Anmeldung können Teilnehmer nicht nur Geld sparen, sondern ermöglichen dem Organisations-Team auch eine großzügigere Planung des Kulturangebots während der PSI-Woche. Also ran an den PC und anmelden - es wird wieder eine spannende Woche werden.



## PSI 2020 en la Luther-urbo Wittenberg

De la 6-a ĝis la 13-a de aprilo 2020 okazos la  
36-a Printempa Semajno Internacia (PSI)  
en la Luther-urbo Wittenberg.

**L**a kultura oferto en ĉi tiu regiono estas bonega – tial ni havos la unuan fojon en 2020 temajn tagojn. Dum tiu tema tago oni povas prepari sin en matenaj prelegoj al la celoj de posttagmezaj ekskursoj. Wittenberg-tago, Bauhaus-tago (Dessau), Wörlitz-tago kaj ne regiona FridaysForFuture-tago kun ekologiaj temoj nuntempe estas planitaj.

Cetera PSI funkcios kiel kutime: matene Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj, aldone prelegoj, metiaĵoj kaj sportoj. La posttagmezo estas planita por ekskursoj – kutime estas 2-3 ofertoj paralele – kaj la vespero estos dediĉita al kulturo. Kiel ĉiam balo okazos, la temo estas, kiel atendite, la mezepoko. Paskan dimanĉon okazos la tradicia ovoserĉado, dum la antaŭa vespero eblos la vizito de Paska foiro. Ŝancoj por sociumi, babilo kaj ludi estas kiel kutime dum la tuta PSI-semajno.

Ni loĝos en la kastela junulargastejo Wittenberg, en tuja najbareco de la kastelpreĝejo, sur kies ĉefa portalo Martin Luther alnajlis siajn 95 tezojn la 31-an de oktobro 1517. La junulargastejo Wittenberg estas parto de la palaca komplekso de Friedrich la Saĝa.

Pliaj detaloj troveblas ĉe <https://psi.esperanto.de>, tie ankaŭ eblas la elektronika aliĝo.

La unua aliĝperiodo finiĝos la 4-an de januaro 2020, la dua la 31-an de januaro 2020, kaj la tria la 29-an de februaro 2020. Aliĝante frue partoprenantoj ne nur ŝparos monon, sed ankaŭ permesos al la organizanta teamo plani pli ampleksan kulturan oferton por la PSI-semajno. Do iru al la komputilo kaj aliĝu – PSI denove estos ekscita semajno.



## 8-a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA)

18. - 23.10. 2020 – Venu vidi „Wendland“!



**E**MA, tio estis bonegaj aranĝoj kun migradoj ĉe la riveroj Mozelo, Rejno kaj Ahr, organizitaj de Wolfgang Bohr kaj Rudolf Fischer. Post paŭzo nova celo de EMA en oktobro 2020 estos „Wendland“, regiono en la nordoriento de Malsupra Saksio, apud la rivero Elbe, inter Hamburgo kaj Berlino. Per kio ĝi famiĝis? Dum la tempo de la germana divido ĝi havis triflanke limojn kun Germana Demokrata Respubliko, kaj okcidentgermanaj politikistoj ekplanis tie, ŝajne tre for, konstrui atomrubaĵojn. Sekvis protestoj, dum jardekoj, kiuj momente silentas!

Dum EMA en amika rondo vi ekkonos pliajn kaj diversajn flankojn de la Wendland. Ĝin distingas vastaj mildaj pejzaĝoj, la altebenaĵo „Drawehn“ etendante ĝis la riverego Elbe, la larĝa iama ĉasarbaro „Göhrde“ de germanaj reĝoj, krome ĉeriveraj malaltaĵoj kun agrikulturo, kanaloj, lagetoj – kaj pitoreskaj urbetoj. Unu tia estas „Hitzacker“ – kun malnovurbeto, kuŝanta kiel trezorkesteto sur insulo inter du riveroj – nia restadloko kaj elirpunkto por migradoj, ekskursoj kaj vizitoj.

Historie kulture la Wendland-on markis slava popolo, parolante ĝis en la 18-a jarcento polaban, slavdevenan lingvon. Ili loĝis en ronde konstruitaj, nun ankoraŭ surprize malgrandaj vilaĝoj, tielnomataj „Rundlingsdörfer“, ebla Monda Kultura Heredaĵo. Komunan placon ĉirkaŭas belegaj faktrabaj bienoj. Ilin savis, rekonstruis ofte kontraŭatomaj aktivistoj kaj artistoj, kiuj (ne nur tiel) kontribuis al pozitiva evoluo de la regiono. Ĝi – kun siaj vilaĝoj – tenis sian originalecon ankaŭ, ĉar influoj de metropoloj kaj ĉar aŭtoŝoseoj foras kelkdek kilometrojn. Tiel parto de la spertoj restadi en Wendland estas ankaŭ malstreĉiĝo... kaj impresoj de riĉa kaj kvieta naturo.

Venu sperti Wendland-on dum EMA en oktobro 2020, kun Gerald Roemer, unu de la aŭtoroj de la libro „111 Orte im Wendland...“ (germanlingve, eldonejo Emons). Li organizos kaj gvidos la migradojn. Informoj kaj aliĝilo sur la retpaĝo [www.esperanto.de/ema](http://www.esperanto.de/ema).

## Esperanto, Englisch und automatische Übersetzung

Babel-Tag an der FU Berlin

**E**inen halben Tag lang ging es am 7. November an der FU Berlin in der Sprachwissenschaft um Babel und mögliche Wege zur Auflösung der Sprachverwirrung. Esperanto, Englisch und automatische Sprachübersetzung wurden im einzelnen vorgestellt und diskutiert.

Den Vortrag zu Esperanto hielt Federico Gobbo, Professor für Esperanto und Interlinguistik an der Universität Amsterdam; er stellte sein Thema in zwei Sprachen vor, zuerst auf Esperanto. Barbara Seidlhofer, Professorin für Englisch als Lingua franca, Amerikanistik und Anglistik an der Universität Wien, sprach über "English as a Lingua franca: Quest, Fact, Controversy". Die Frage, wie maschinelle Übersetzung heute funktioniert, erläuterte Josef van Genabith, Professor für Multilinguale Technologien am Deutschen Forschungszentrum für Künstliche Intelligenz in Saarbrücken.

Am Abend gab es eine Podiumsdiskussion der drei Vortragenden in einem mit etwa hundert Personen gut gefüllten Raum; unter den Gästen war auch der polnische Botschafter in Deutschland, Prof. Andrzej Przyłębski, aus persönlichem Interesse; er hat ja schon mehrfach seine Unterstützung für Esperanto bekundet.

Eingeleitet wurde der Babeltag mit einem 90-minütigen Sprachkurs Esperanto, den ich gehalten habe. Erfreulicherweise gelang es, die ZuhörerInnen zum wiederholten und fleißigen Üben in Zweier- und Dreiergruppen anzuregen, nach verschiedenen Dialogmustern; es hat den anwesenden Studenten und Professorinnen sichtlich Freude gemacht, mit Esperanto schon in der ersten Lernstunde eigene Wörter und Sätze bauen zu können.



Die Podiumsdiskussion hat, wie man ahnen kann, nicht nur das Lob des Esperanto gesungen. Die Auffassung, Esperanto sei gescheitert, kann ich nicht teilen; Esperanto verbreitet sich zusehends, in vielen Bereichen; am deutlichsten sieht man das im Internet. Auch die Annahme, wenn man Esperanto einführen würde, hätte man nach kurzer Zeit alle Probleme von ethnischen Sprachen erneut, erscheint mir eher als unbegründete Spekulation der Englisch-Lobby; die bisherige Geschichte der Esperanto-Sprachpraxis deutet darauf jedenfalls nicht hin.

Frau Prof. Seidlhofer setzt sich für die Anerkennung des Englisch-Fremdsprachlers und seiner Sprachbenutzung ein - in der Praxis findet sich das allerdings, wie auch gesagt wurde, noch nicht in sehr vielen Bereichen; es ist und bleibt wohl klüger, etwa eine Doktorarbeit in dem makellosen Englisch eines Muttersprachlers einzureichen als in "Continental English". Ansonsten stimmen sicherlich viele einer einleitenden Bemerkung zu, dass uns Nicht-Englischsprechern das Englische "übergeholfen" wurde - so recht weiß man nun nicht, wie man der entstandenen Situation entkommen kann.

Aus dem Publikum war die gelegentlich vertretene Ansicht zu hören, Esperanto sei als globale Sprache nicht geeignet, weil die Sprachbasis im wesentlichen europäischen Sprachen entnommen sei. Interessant ist, dass eine ähnliche Aussage von den Englisch-Anhängern nur ganz selten über das Englische gemacht wird... Es wurde auch die Auffassung vertreten, die EU sei mit ihrer starken Nutzung des Englischen auf dem falschen Wege.



Spannend ist auch das, was mir so am Rande mitgeteilt wurde, jetzt und schon vor ein paar Wochen. So wurde mir z.B. die Frage gestellt, warum wir eigentlich nicht alle Esperanto sprechen - und das durchaus mit viel Sympathie für Esperanto. Jemand anders meinte, wenn die EU mutig wäre, dann würde sie allgemein Esperanto schon im Kindergarten einführen. Aus dem Kreise von Hochschullehrern der Anglistik und Romanistik hatte ich solche Aussagen wirklich nicht erwartet. Gelernt habe ich auch, dass manche Personen, die sich negativ zu Esperanto geäußert haben, möglicherweise weder damit noch allgemein in der Linguistik beliebt sind.

Es ist interessant, wie die Veranstaltung entstanden ist. Gelegentlich versende ich an eine Liste von Berliner Sprach- und Linguistik-Interessierten Informationen zu Esperanto. Vor zwei Jahren hat mir einer der FU-Professoren geantwortet und nach Esperanto gefragt; ich wurde dann gelegentlich zu Veranstaltungen an der FU eingeladen. Nach einer Podiumsdiskussion kam ich mit ein paar Professoren ins Gespräch; zumindest einer von ihnen wusste bereits, dass der niederländische Linguist Kees Versteegh schon 1993 über Esperanto als Muttersprache geschrieben hat (Esperanto as a first language. *Linguistics* 31, 539-555; auch wenn wir Esperanto-Sprecher das nicht leicht nachvollziehen können - für Linguisten ist die Existenz einer muttersprachlichen Esperanto-Gemeinschaft der einleuchtendste Nachweis, dass Esperanto täglich benutzt wird und eine lebende Sprache geworden ist). Im Sommer haben die FU-Romanisten dann Federico Gobbo zu einem Gastvortrag über Sprachpolitik nach Berlin eingeladen und auch den Babel-Tag geplant. Einen solchen halben Tag zu einem soziolinguistischen Thema veranstaltet die FU-Sprachwissenschaft seit einiger Zeit alljährlich zum Beginn des Wintersemesters.

Die Veranstaltung hat auch das Interesse des Senders Radio Berlin-Brandenburg (RBB) geweckt. Ein paar Tage vorher wurde einer der veranstaltenden Professoren, Horst Simon, zu einem kurzen Interview über die Podiumsdiskussion eingeladen, in dem er auch Esperanto einschließlich der Existenz von Muttersprachlern vorgestellt hat.

Lu Wunsch-Rolshoven

## Stuttgart en Esperanto

**Sur la monumenta enirejŝildo de la nova tramtunelo la urbo Stuttgart (Esperante Stutgarto) skribis sian nomon en 30 diversaj lingvoj. Sur la sepa loko troviĝas "Stutgarto".**

**L**a konstruado de tiu tramtunelo estas parto de la trajnsistemprojekto "Stuttgart 21". La fifama "Stutgarto 21" kostos minimume 7,7 miliardojn da eŭroj kaj daŭros almenaŭ ĝis 2025. Momente ĝi estas la plej granda konstruejo de Eŭropo. Rainer Kurz prelegis pri tiu projekto Esperantlingve en 2014.





La ŝildego kun la Esperantonomo "Stutgarto" troviĝas en tre centra loko de Mailänder Platz, apud la nova stutgarta urbobiblioteko (videbla malantaŭe). Laŭ Yasho la tria lingvo en la dua linio estas Gujarati kaj la kvara en la tria linio estas Panjabi. Ĉu vi povas diveni la aliajn lingvojn sur la ŝildo?



## Honoroficaj kunaktivuloj serĉataj!

**Germana Esperanto-Centro (Interkultura Centro Herzberg) en la Esperanto-urbo Herzberg por konstanta aktivado kaj elkonstruado bezonas aktivajn kunrespondeculojn!**

**D**anke al senlaca laborado dum la lastaj jardekoj ekestas ĉi-tie la plej ampleksa „Esperanto-servokatalogo“. Ekestis vigla Esperanto-kulturvivo dum la tuta jaro.

Nia varia sudharca turisma regiono estas tre centra en Germanio kaj bone atingebla.

Same ekzistas eblecoj lerni la germanan lingvon kaj poste trovi laborlokojn.

Bonvenon por konstanta vivado aŭ kelksemajnaj kunhelpoj!

Specialistoj estas aparte bonvenaj ekz. por:

- 1) Financado kaj subvencioj, 2) Varbado kaj grafikaĵoj, 3) Asistanto resp. sekretario.
- 4) Fakaj tradukoj + retlaboradoj, 5) Bibliotekaj kaj arkivaj taskoj.

Komune ni estos pli fortaj! Dankon pro via intereso.

Bv. kontakti Peter Zilvar (Tel. 05521-5983) aŭ rete:

[zilvar@t-online.de](mailto:zilvar@t-online.de)

## Libroj por la Ŝtata Biblioteko en Berlin

**„Staatsbibliothek Preußischer Kulturbesitz“ en Berlin – unu el la plej gravaj sciencaj bibliotekoj en Germanio – jam havas kolekton pri Esperanto kaj aliaj planlingvoj, fakte eĉ du kolektojn: la malnovajn kaj la pli aktualajn eldonaĵojn.**

**G**EA estas en regula kontakto kun la biblioteko, ĉar ni havas intereson ke Esperanto-libroj estu daŭre kaj profesie konservataj en publike alirebla loko. Ni tial ankaŭ klopodas iom post iom transdoni al ĝi tiujn librojn, kiujn nia oficejo ricevis (la plej multajn el heradaĵoj). Por tio ne sufiĉas tien sendi kamionplenojn da libroj: la biblioteko atendas liston laŭ katalogaj kriterioj, kiun ĝi unue povu ekzameni, por decidi, kion transpreni. Kaj tiun laboron ni mem devas prizorgi.

Antaŭ pli ol jaro GEA do sendis unuan liston de 240 libroj. El ĝi la biblioteko elektis 84 verkojn, kiujn ĝi ankoraŭ ne havis – inter ili bibliofilajn raraĵojn kiel kajereton pri Volapük. La 10-an de oktobro ni tiujn unuajn 84 povis transdoni al Staatsbibliothek. Centoj tamen restas ankoraŭ en la garaĝo de la oficejo: ilin necesas trarigardi kaj listigi, por prepari la venontan transdonon. Helpo ĉiam estas bonvena!

**Ulrich Brandenburg**



**Barbara Brandenburg nome de GEA transdonas 84 librojn al Ursula Stanek, respondeculino de la sekcio „donacoj“ de la Ŝtata Biblioteko en Berlin.**

# Kuriero inter najbaroj

**Regule trafikaj IC-traĵoj inter Berlino kaj Varsovio. En la kupejoj sidas turistoj, komercistoj, oficistoj, kiuj donas vivon al la najbaraj interrilatoj de Germanio kaj Pollando.**

**L**a limon plimulto perceptas nur pro la diversvestita personaro kaj la alilingvaj laŭparolilaj anoncoj – se entute. Kelkaj eble miras pri la senkomenta halto en stacio, ne menciita en la horaro, stacio sen kajoj, sed kun multaj bluaj kvadrataj ŝildoj apud la trakoj.

Doganaj kaj pasportaj kontroloj fariĝis superflujaj en „Schengen-lando“, la interna zono de Eŭropo. Landlimoj tamen ofte restas ankaŭ sistemaj limoj en la eŭropa fervoja reto. La pola fervojo ekzemple sur siaj linioj disponigas elektran energion kun 3.000 V, kontinua kurento, la germana kun 15.000 V, alterna kurento. Diversaj estas ankaŭ la ĉetrakaj sekurigaj sistemoj, gardantaj la respekton de veturmalpermesoj kaj rapideclimigoj. Lokomotivoj, kiuj transiru tiajn sistemajn limojn, bezonas la kapablon adaptiĝi al la respektivaj cirkonstancoj. Amiko sugestis nomi ilin „Esperanto-lokomotivoj“, kvankam la bildo iom stumblas, ĉar fakte ili estas „poliglotoj“. Por ŝalti inter la sistemoj, tiuj poliglotoj bezonas tempon kaj lokojn, haltstaciojn kiel „Oderbrücke“ – tiun kun la bluaj ŝildoj.

Lokoj kiel tiu stacio, temoj kiel „ETCS“, la trajnsekuriga Esperanto en Eŭropo, stacidomaj konstrustiloj, kargaj instalaĵoj aŭ aliaj fervojrilataj aferoj, estas prezentataj tradicie dum Internaciaj Fervojistaj Kongresoj (IFK) de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF).

En la jaro 2020 okazos la 72-a IFK kun la germana kaj la pola Esperanto-asocioj en Frankfurt apud Odro kaj Slubice.

La Transponta Kongreso (TRAKO), kiel la organizantoj ĝin titolis, havos komunan programon dum la pentekostaj tagoj kaj fervojecan programon daŭranta ĝis la vespero de la postpentekosta jaŭdo. Fervojeca programo signifas, ke ĝi ne nur turnas sin al fervojistoj kaj fervojaj fakuloj, sed al ĉiu

interesulo. Ĝi ofertas ankaŭ turismajn elementojn, por kiuj dum la pentekostaj tagoj mankas la tempo.

Por tiu, kiu libere disponas pri sia tempo, aŭ kiu en la kalendaro por 2020 ankoraŭ ne estas elĉerpinta ĉiujn feriotagojn, utilas pripensi partoprenon en la tutsemajna fervojista aranĝo de la 29-a de Majo ĝis la 5-a de Junio 2020. Aliĝo eblas sur la retpaĝo [www.esperanto.de/ifk](http://www.esperanto.de/ifk).

**Guido Brandenburg**

Sur la bildo: IC-traĵo kun poliglota lokomotivo survoje de Berlino al Varsovio (fonto: Mediathek Deutsche Bahn).

## Esperanto- Blindenverband Deutschlands e.V.



**Neuwahl des Vorstandes des Esperanto-Blindenverband Deutschlands e. V., in Esperanto: Esperanto-Blindulligo de Germanujo (Eblogo).**

**V**om 18.10.2019 bis zum 20.10.2019 hatte der Esperanto-Blindenverband Deutschlands e. V., in Esperanto: Esperanto-Blindulligo de Germanujo (Eblogo), zu einem Veranstaltungswochenende in die deutsche Esperantostadt Herzberg am Harz eingeladen. Es wurde u. a. die größte Blindenschriftbücherei der Welt für Esperantoliteratur vorgestellt. Die über 500 dicken Brailleschriftbände sind in den Räumen der ehemaligen Schule in Herzberg-Sieber zur weltweiten Ausleihe gelagert. U. a. informierte der Leiter des Esperantozentrums in Herzberg, Peter Zilvar, über sein Arbeitsgebiet und lädt gerne zu einem Informations- und Leseurlaub in die deutsche Esperantostadt ein. Außer den Blindenschriftbüchern liegen auch viele Bücher und Broschüren für sehende Interessenten bereit.

Am Samstag 19.10.2019 fand im Hotel „zum Pass“ in Herzberg-Sieber eine Mitgliederversammlung mit Neuwahlen statt. Es wurden folgende Personen in den Vorstand von EBLOGO gewählt:

Werner Groen, wohnhaft in 26826 Weener (Vorsitzender/Präsident).

Kontakt: [WernerGroen@t-online.de](mailto:WernerGroen@t-online.de)

Mobil: 0151/54 82 69 07

Natalia Kasymova, wohnhaft in Marburg (stellvertretende Vorsitzende).

Heinz-Peter Engels, wohnhaft in Saarbrücken (Schriftführer)

Theodor Speckmann, wohnhaft in Köln (stellvertretender Schriftführer).

Rimarko de la red.: Aperis la la 9-a numero de "Esperanta ligilo" por 2019, vidu: <http://www.libe.slikom.info/ligi.htm>





# Mia unua IKBE-kaj UK-vizito kiel nova blinda esperantisto

## Por eviti la mensan malevoluon post la emeritiĝo, mi ekinteresiĝis pri la planlingvo Esperanto.

**M**ia unua kontakto kun tiu lingvo okazis antaŭ kelkaj jaroj en la loka Esperanto-grupo en Leer. La interreto kun ĝiaj multaj eblecoj kaj la persona helpa kontakto kun esperantistoj fine alportis min al nivelo, de kiu mi povus daŭre lerni sendepende. Ĉe Esperanto-eventoj en Germanio kaj Nederlando mi faris pliajn pozitivajn spertojn kun la logike strukturita planlingvo. Do mi havis la deziron, kun la vidanta amiko partopreni la 104-an Universalan Kongreson (UK) de Esperanto kaj la 85-an Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj (IKBE) en 2019, en Finnlando.

La 13-an de Julio 2019 la esperantisto Andreas Diemel el Duisburg, kaj mi el Weener, veturis per trajno, buso kaj pramo al la du Esperanto-Kongresoj en Finnlando. En unusemajna vojaĝo ni veturis tra Berlino, Varsovio, Bialistoko, Kaunaso, Rigo, Talino kaj Helsinkio – al la vintra sportejo Lahti. Ni vizitis survoje plurajn lokajn Esperanto-grupojn, la Esperanto-radiostacion Varsovia Vento kaj multajn vidindaĵojn, ekzemple ankaŭ areon de la nova Baltic Rail.

La 104-an Universalan Kongreson de Esperanto de la 20-a de Julio 2019 ĝis la 27-a de Julio 2019 partoprenis ĉirkaŭ 1000 homoj el pli ol 60 landoj. Centra kongresejo estis la sketadareno kun ĝiaj apudaj ĉambroj en Lahti en Finnlando. Pli ol

60 informaj standoj prezentis vastan merkaton de ŝancoj por multaj Esperanto-interesatoj. Krome estis multaj interesaj prelegoj, ekskursoj kaj diversaj kulturaj programoj en la lingvo Esperanto.

Paralele kun la UK okazis la 85-a IKBE, Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj. Dimanĉe, la 21-an de Julio, en la tria etaĝo de la apuda konstruaĵo al nia hotelo Grand, okazis solena malfermo de IKBE. En la komenco estis pluraj bonvenaj vortoj kaj malfermaj paroladoj. Ĉi-jare estis 48 partoprenintoj. Marde matene okazis raporto de industria entreprenisto, direktoro de firmao Innojok Oy. Post tio, de la 10-a ĝis la 12-a horo, okazis la ĝenerala asembleo de IKBE. Anatoli Masenko klarigis, ke la sekva IKBE povus esti en Samara, sur la Volgo en Rusio, fine de junio 2020. Samara havas ĉirkaŭ 1.150.000 loĝantojn.

Posttagmeze okazis prelego pri la finna manĝo kaj la finna kuirarto. Antaŭ ĉirkaŭ 150 jaroj estis malsato en Finnlando kaj homoj manĝis nur tre simplajn manĝaĵojn, kiel bulbojn aŭ napojn, ofte kun boligita arba ŝelo. Napo-tranĉaĵoj kaj pecoj da simpla kruda seka pano estis proponitaj por gustumi. Ĉar la terpomo devenas de Peruo, ĝi ricevis la nomon Peruano.

Ĵaŭdon antaŭtagmeze dum tri horoj estis klarigita la varieco de japanaj vestaĵoj, kaj kimonoj estis prezentitaj al blindaj partoprenantoj por pripalpi kaj surmeti. Dum tiu kongresa parto ĉeestis finna ĵurnalistino, kiu ankaŭ faris plurajn fotojn kaj multajn notojn.

Ĵaŭde post vespermanĝo la partoprenantoj de IKBE organizis internacian artan vesperon. Estis prezentitaj amuzaj distraj tekstoj, solokantado, trivoĉa ĉenkantado, japana koruskantado en la lingvo Esperanto kaj pian-muziko el diversaj regionoj de la mondo. La kongreso finiĝis vendrede vespere per IKBE-renkontiĝo en restoracio ĉe la lago.

La revena vojaĝo portis nin per balta pramŝipo preter Mariehamn al Stokholmo kaj per buso kaj trajno tra Kopenhago, Christiania, Rødby kaj Puttgarden al Germanio. Vespere la 30-an de Julio ni kun multaj novaj impresoj kaj freŝa Esperanto-eŭforio venis al niaj hejmurboj.

Mi precipe rimarkis, ke Esperanto estas parolata tutmonde sen regionaj akcentoj. Do facile ekestas rilato-kreanta konfidenco. Mi ankaŭ rimarkis, ke pluraj blindaj esperantistoj havis kiel akompanantojn Esperanto-parolantojn el aliaj landoj. Fakte, Esperanto estas spirite postulema, unuiga, tolerema lingvo.

**Werner Groen**

26826 Weener, Norderstraße 15,

Retpoŝto: [wernergroen@t-online.de](mailto:wernergroen@t-online.de)

**Dum la 104-a Universal Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Lahti, Finnlando, la finna ĵurnalo *Etelä-Suomen Sanomat* (ESS) plurfoje raportis pri Esperanto per longaj artikoloj, inter kiuj estas raporto en ambaŭ lingvoj, la finna kaj Esperanto.**



## Expolingua in Berlin am 22. und 23.11.2019

**Der Deutsche Esperanto-Bund hat sich zum zweiten Mal in Folge als Aussteller der Berliner Sprachenmesse Expolingua präsentiert und wird damit dem Ziel, Menschen über Esperanto zu informieren, mehr als gerecht.**

**D**ie Vorbereitung wurde von Barbara und Ulrich Brandenburg, sowie Lu Wunsch-Rolshoven übernommen. So gab es einen Mini-Sprachkurs für die Besucher der Messe und einen sehr gut ausgestatteten Stand mit attraktiven Werbegeschenken, leckeren Butterkeksen und besonders für Kinder sehr einladenden Heliumballons. Aufgrund eines Unfalls konnte das Ehepaar Brandenburg nicht mit uns den Stand betreuen, trotzdem half Ulrich beim Auf- und Abbau und besuchte uns auch für eine Weile. Am Freitag um 9 Uhr trafen Lu und Michaela im Russischen Haus der Wissenschaft und Kultur ein, um den 2 m<sup>2</sup>-großen Stand zu dekorieren. Kurz nach 10 strömten die Besuchermassen auch schon durch die Tür. Am Freitag Vormittag vor allem auch Schulklassen, die den Auftrag erhielten, sich von den Ständen informieren zu lassen und einen Laufzettel auszufüllen.

Unser Glücksrad war dabei erneut ein Besuchermagnet. Hallo! ¡Hola! Saluton! Hello! Bonsoir! Hallo, hallo! Und, schon mal von Esperanto gehört?

Mit einer Sprachvielfalt, die einem sonst eher nur auf Esperantoveranstaltungen selbst begegnet, haben wir von der DEJ und dem DEB auf der Expolingua allerlei Leute über eben jene Möglichkeit der Diversität informiert.

Von interessierten Polyglots, über interessierte Uninformierte, bis zu Leuten mit alten Kamellen vom Sohn des Bruders der Tante, der schon Esperanto gesprochen hat, war an Besuchern alles dabei. Viele konnten sich für Esperanto oder Glücksradkekse begeistern lassen, und nahmen sich Informationen von uns mit und ließen ihre Kontaktdaten bei uns, um sich über mögliche Sprachkurse und Veranstaltungen in der Zukunft informieren zu lassen.

Die tapferen Informierenden am Stand waren Lu, Michaela, Paul, Christoph Knabe, Georg Jähmig und einige zufällig vorbeigekommenen Esperanto-Sprecher. Alle die da waren, waren dauerhaft im Gespräch mit Interessenten und man war froh, wenn man einmal eine Pause hatte, um seine Stimme zu schonen oder auch einmal die anderen Stände zu begutachten. Insgesamt hat es allen Beteiligten viel Spaß gemacht, man hat selbst noch einiges dazu gelernt, wie man besser für Esperanto wirbt, und natürlich, was die meisten Menschen so alles wissen möchten. Fazit von unserer Seite: nächstes Jahr auf jeden Fall wieder!

**Eure Michaela Stegmaier  
und Paul Würtz**



# 16-a Rata Rendevuo en Einbeck



Partoprenantoj de la urba ĉiĉeronado antaŭ la Domo de Eicke

**Jam la 16-an fojon la Esperanto-grupo Hamelno (Hamel) invitis geamikojn el la najbaraj grupoj en Hannover, Detmold, Bielefeld kaj Paderborn al la Rata Rendevuo.**

**S**ed kelkaj el la ĉ. 20 partoprenantoj prenis pli longan vojon kaj venis el Marburg kaj Hanau en la sudo kaj Nordenham en la nordo. Ĉi-foje oni vizitis la bieran kaj mustardan urbon Einbeck. Ĉar vizito de la bierfabriko semajnfine bedaŭrinde ne eblis, oni povis gustumi la faman bieron nur dum la rustikala tagmanĝo en la restoracio „Brodhaus“. Kaj ankaŭ la loka mustarda supo kaj mustarda eskalopo tie gustis bonege.

Jam matene oni salutis unu la aliajn en la glaciaĵejo „Dolomiti“ kaj tuj poste oni iris al „PS.Speicher“. En tiu ekspozicio pri la historio de la rado la tempo pasis rapidege kaj multajn ekspoziciaĵojn oni eĉ ne povis vidi. Tre vigle kaj entuziasme la ĉiĉerono rakontis rakontetojn kaj anekdotojn pri la unuopaj veturiloj: pri la barono de Drais, kiu inventis la unuan kurradon, pri la akcidento dum bremsado ĉe altbiciklo (kion kaŭzis al la biciklanto faladon antaŭen pro la



Bongustas la mustarda eskalopo kaj la Einbeck-a biero ene de grandega barelo en la restoracio „Brodhaus“.



antaŭenigo de la pezcentro dum tro forta bremsado), pri la danĝereco de la unua serie fabrikita motorciklo de la firmao Hildebrand & Wolfmüller, el kies motorcikloj triono iam ekflamiĝis, ĝis la diversaj produktmanieroj de motorcikloj kaj aŭtomobiloj en la orienta kaj okcidenta partoj dum la tempo de la du germanaj ŝtatoj. Oni multe pli longe povus aŭskulti la rakontojn, sed subite estis fino kaj kelkaj certe duan fojon revizitos „PS.Speicher“.

Dum la tagmanĝo en la plej malnova restoracio de Malsupra Saksio ankaŭ estis ebleco por interŝanĝi spertojn kaj aŭskulti novaĵojn el Esperantujo. Sufiĉe novaj ja estas la kalendaro pri renkontiĝoj [eventaservo.org](http://eventaservo.org) kaj la nova ludo por smartfonoj „Vortludo“, kiu simile funkcias kiel Skrablo: [www.vortludo.com](http://www.vortludo.com). Posttagmeze okazis ĉiĉeronado tra la historia urbocentro de Einbeck. Ĝi estas vere ĉarma urbeto kun la plej longa strato kun ligitaj trabfakaj domoj en norda Germanio kaj kun interesa historio, ne nur pri biero kaj mustardo. Imprese, kiel kunhelpas la enloĝantoj por konservi la historiajn konstruaĵojn kontraŭ kadukiĝo kaj rebriligi la domojn, ekz. Eickesches Haus.

Dum kafumado kaj manĝado de bongustaj tortoj en la kafejo Steinhauŝ oni povis babili pri eventoj kaj vojaĝoj venontjare. Kelkaj planas vojaĝi al la UK en Montrealo, al la Transponta Kongreso en Frankfurt/Odro aŭ al la Itala Kongreso en Assisi. Kaj post bela tago dum adiaŭo oni promesis ankaŭ venontjare denove veni al Rata Rendevuo. Informoj pri la renkontiĝoj de la Ratkaptista Bando en Hamelno ĉiam troveblas sur la paĝoj [esperanto.de/hameln](http://esperanto.de/hameln) kaj [eventaservo.org/o/RB](http://eventaservo.org/o/RB).



Atente la partoprenantoj aŭskultas la anekdotojn de la ĉiĉerono.



# Lerni Esperanton per la Ratkaptisto de Hameleno

## Kiel enkonduki Esperanton en 50 minutoj?

**I**om hazarde mi konatiĝis kun Bart Demeyere. Dum feriado en Belgio mi vidis lin sufiĉe proksime per Amikumu kaj kontaktis lin per la mesaĝilo de Amikumu. Kvankam tiam ne estis ebleco por renkontiĝi, ni iom babilis. Bart ja estas la programisto de ViVo <http://konoj.org/be/vivo/>, la reta kolektado de diversaj Esperanto-vortaroj.

Krom tio li ankaŭ verkis enkondukan Esperanto-lecionon pere de la infanlibreto de Hanna Hutchinson „La ŝalmisto de Hamelin“. Sur lia retpaĝo li belege klarigas kaj prezentas en filmoj, kiamaniere li uzas tiun bildlibron por enkonduki Esperanton. Rigardu la paĝon ĉe: <http://konoj.org/sxalmisto/>. Li tie ofertas sian materialon ankaŭ al aliaj. Kiel klubestro de la „Ratkaptista Bando“ en Hameln, la urbo de la Ratkaptisto, mi preskaŭ sentis min iom devigata adapti tiun prezentadon ankaŭ al la germana.

Kaj preskaŭ samtempe venis demando de la kulturcentro, en kiu ekde multaj jaroj okazas la regulaj renkontiĝoj de la loka klubo, ĉu ankaŭ ni pretas fari ion okaze de la 40-jariĝo de la kultur- kaj komunikad-centro Sumpflume. Kaj do jen bona ebleco oferti malferman enkondukan lecionon kaj ŝanco por finfine traduki la klarigojn pri la „Ŝalmisto de Hamelin“ al la germana. Iom mi ekzercis antaŭe por prezenti ĝin, simile kiel Bart. Kaj, kvankam ne venis multaj interesitoj, la ĉeestantoj tre interesiĝis, kaj ankaŭ mi kontentas kaj pensas, ke ĝi estas bona ebleco prezenti Esperanton. – Koran dankon al Bart pro lia laboro!

Se vi ŝatus elprovi tion, aŭ eble nur rigardi ĝin, legu la priskribojn sur la paĝo de Bart, kie vi ankaŭ trovos mian tradukon en la germanan, kiun vi povas elŝuti kiel Power-Point-prezentadon: [konoj.org/sxalmisto/esperantoPerSxalmistoDE.pptx](http://konoj.org/sxalmisto/esperantoPerSxalmistoDE.pptx). Bonan amuziĝon kaj instruadon!

**Heinz W. Sprick**



# Grupo Lietzensee festis sian 40-jariĝon

novembro  
2019  
06  
merkredo

14:00 - 17:30  
Eŭropo/Berlino

40-jara jubileo ne estas tiom eksterordinara: pluraj el niaj Esperanto-grupoj intertempe estas pli ol centjaraj.



**S**ed malofte okazas, ke la fondiĝo kaj la aktivecoj de Esperanto-grupo estas tiom ligitaj al unu persono. La festo en Berlin-Lietzensee la 6-an de novembro do estis kvazaŭ persona jubileo de Hans Moser, kiu fondis kaj dum jardekoj energie gvidis la grupon. Ĉeestis kaj kunfestis kvardeko da grupanoj, gastoj kaj kunbatalantoj. La festparoladon en du lingvoj faris Phillip Sonntag, estrarano de Esperanto-Ligo Berlino-Brandenburgio. Por gratuli persone venis Petro Chrdle el Ĉeĥio, multjara amiko de la grupo, kaj la prezidantoj de ELBB (Esperanto-Ligo Berlin/Brandenburg) kaj GEA. Multaj skribaj mesaĝoj venis el eksterlando.

El la albumo de la grupo Hans Moser montris fotojn, kiuj ilustras eksterordinaran historion: rilatojn kun partneraj Esperanto-grupoj, komunajn vojaĝojn kaj komunajn festojn. Tipa ankaŭ estas la komuna muzikado: ne surprize do, ke la jubilean vesperon akompanis akordeona muziko (ludis Aleksandr Danko), kaj ke pianludis Hans Moser mem (li eĉ sukcesis kantigi la ĉeestantojn).

Koran gratulon al Hans kaj la tuta grupo: ne lacigeblaj motoroj de Esperanto en Berlino!

**Ulrich Brandenburg**





## Esperanto-Kafejo en Herzberg

**Dum Germana Esperanto-Kongreso en Braunschweig, antaŭ dekdu jaroj, la tiama urbestro Gerhard Walter informis, ke oni oficiale nomas la urbon Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo.**

**T**io interesis mian edzinon kaj min, kaj ni translokiĝis tien. Mia korea edzino Song Jeong-ok malfermis ginsengo-butikon, kiun ŝi iom poste ankaŭ nomis Esperanto-Kafejo, pro la Esperanto-urbo.

Dum la pasintaj jaroj ŝi informis amason da interesuloj pri Esperanto, dum ili trinkis sian ginsengan teon, alian korean herban teon aŭ kafospecialaĵojn.

Antaŭ kelkaj monatoj vizitis nin ŝia filo, en Koreio fame konata fotisto. Li refotis ĉiujn produktojn de nia retbutiko kaj rearanĝis la Esperanto-Kafejon. Pro tio ni aranĝis feston, kiun partoprenis multaj esperantistoj, precipe de BEMI, kelkaj Herzberg-anoj kaj fotisto de Harz-Kurier.

Nun aperis longa artikolo pri nia historio en Harz-Kurier, ĉar ĝi havas rilaton al Herzberg kaj precipe al Esperanto, titolita „Amhistorio en Esperanto“. Ĝi dokumentas nian rilaton dum la UK en Tampere ĝis hodiaŭ kaj la gravan rolon de mia edzino en la informado pri Esperanto: <https://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article227562447/Eine-Liebesgeschichte-auf-Esperanto.html>

La Esperanto-Kafejo troviĝas meze de Herzberg en la piedira zono. Vi estas ĉiam bonvenaj kaj kompreneble ekzistas ankaŭ repaĝo en Esperanto: <https://ginseng.kaufen/esperanto-kafejo>.

Famaj esperantistoj jam estis ĉi tie: Brian Moon de la Akademio de Esperanto, la nova prezidanto de UEA kaj la prezidanto de GEA Ulrich Brandenburg, por nomi nur kelkajn. Nia ideo estas kolekti multajn lingvojn por la trinkajkartoj. Ĉiu ekzistas el tri partoj: korea, nacia, Esperanta. Ni esperas, ke vi ankaŭ kontribuos.

Ĉi tie en Herzberg estas ankaŭ la centro de Internacia Naturkuraca Asocio (INA).

**Harald Schicke**



## Zamenhof-Festo en Hamburg

**En la pasinteco la Zamenhof-Festo ĉiam okazis en decembro, kiam naskiĝis la majstro. Sed bedaŭrinde ofte anoj de Esperanto Hamburg pro diversaj kialoj ne povis partopreni.**

**T**ial ĉi-jare la festo okazos unu monaton poste, sabaton, la 18-an de januaro, kaj ankaŭ en alia ol la kutima renkontiĝejo: en la salono de „Stadtteilhaus Horner Freiheit“, Am Gojenboom 46, 22111 Hamburg, ĉe la U2/U4-haltejo „Horner Rennbahn“ kaj tuj apude de la Esperanto-arbo. Ni komencos jam je la 14:30 h kaj la kotizo de 10 € enhavos (preskaŭ) senĉesajn kafon/teon kaj kukon. Ni aŭskultos la festprelegon de nia prezidanto Jürgen Wulff. Nia kara membro Carsten Schnathorst – al ĉiuj konata je la nomo "Kaŝi" – prezentos sian belegan voĉon. Ralph Glomp surscenigos spektaklon de Anton Ĉeĥov, kiu naskiĝis nur kelkajn semajnojn post Zamenhof en januaro 1860 – do ambaŭ nun festos la 160-an naskiĝdatrevenon. Ĉu ankaŭ vi deziras pliriĉigi la feston per prezentado de poemo, rakonto aŭ danco? Estu bonvena – same kiel gastoj kaj amikoj de Esperanto Hamburg. Antaŭa aliĝo necesas: [info@esperanto-hamburg.de](mailto:info@esperanto-hamburg.de)

In der Vergangenheit fanden die Zamenhof-Feste immer im Dezember statt, dem Geburtsmonat des Autors des Esperanto. Leider konnten viele Mitglieder aus verschiedenen Gründen dann nicht daran teilnehmen. Aus diesem Grund findet die Feier in diesem Jahr einen Monat später statt und zudem noch in einer anderen Lokalität als der gewohnten. Das Zamenhof-Fest findet am Samstag, den 18. Januar 2020 um 14:30 h im "Stadtteilhaus Horner Freiheit", Am Gojenboom 46, 22111 Hamburg, direkt an der U2/U4-Haltestelle "Horner Rennbahn" und gleich neben dem Esperanto-Baum statt. Der Teilnehmerpreis von 10 € beinhaltet Kaffee oder Tee und Kuchen. Der Vorsitzende von Esperanto Hamburg e.V. wird die Festrede halten. Unser geschätztes Mitglied Carsten Schnathorst, den alle unter dem Spitznamen "Kaŝi" kennen, wird uns mit seiner schönen Stimme beglücken. Ralph Glomp präsentiert ein Spektakel von Anton Tschekow, der nur wenige Wochen nach Zamenhof im Januar 1860 geboren wurde - somit feiern beide nun ihren 160. Geburtstag. Wenn auch Du das Fest mit einem Gedicht, einer Geschichte oder einem Tanz bereichern möchtest, dann melde Dich gerne. Wir freuen uns auch über Gäste und Freunde von Esperanto Hamburg. Um Anmeldung wird gebeten. [info@esperanto-hamburg.de](mailto:info@esperanto-hamburg.de)



**Esperanto in Hamburg**  
Kommunikation auf Augenhöhe!

# Instru-semajnfino - vendredo ĝis dimanĉo: Arto-ŝoko. 15.-17.05.2020

Unika lingvokurso-programo surbaze de la vivo kaj arto de la granda pentristo Vincent van Gogh. Dum la kurso ni celas evoluigi la kompren- kaj parolkapablojn, kaj ekzercigi vin ankaŭ pri gramatiko.

**V**i certe riĉigos vian vorto-stokon rilate al arto, naturo, filozofio, sed ankaŭ pri malsano, geografio, astronomio kaj pri ĉiutagaj temoj. Kadre de la kurso ni havos ilustritajn prelegojn, solvos kompren-ekzercojn, diskutos, faros rolludojn, aranĝos vivpenetraĵojn, partoprenos juĝprocezon, tradukos tekstojn, priskribos pentraĵojn, ĉiĉeronos en artgalerioj (veraj kaj kreataj de ni). Instruos: Katalin Kováts.

Por partopreni oni bezonas neniun artotalenton, eĉ ne speciale kompreni kaj ŝati Van Gogh – tio venos dum la kurso! Kadre de la programo ni enrigardos ankaŭ en la koncernan – kaj el arthistoria vidpunkto tre gravan – tempoperiodon, traktos verkojn de aliaj pentristoj. La partoprenantoj estas petataj kunpreni unu el siaj ŝatataj pentraĵoj (ankaŭ kopioj taŭgas), pentritan en la 19-a jarcento. La laboro dum la kurso okazos sur pluraj niveloj, tial bonvenas partoprenantoj de lingvoniveloj B2 ĝis C1. Por lingve malpli fortaj okazos paralela kurso kun Sylvain Lelarge. Dato: 15-17 majo 2020, de vendredo vespero ĝis dimanĉo posttagmezo. Loko: Kulturladen St. Georg, Alexanderstr. 16, 20099 Hamburg, Germanio. Kursokotizo: Vendredo



15€ – sabato 30€ – dimanĉo 15€ / aŭ por la tuta tempo 50€. Antaŭa aliĝo estas necesa, bonvolu turni vin al

Esperanto Hamburg e.V. [info@esperanto-hamburg.de](mailto:info@esperanto-hamburg.de). Por partoprenantoj de aliaj urboj aŭ landoj ni helpas trovi tranokteblojn.

Freitagabend 15. Mai 2020 bis  
Sonntagnachmittag 17. Mai 2020: Lern-  
Wochenende mit Katalin Kováts und Sylvain  
Lelarge. – Erlebe ein einzigartiges Lern-  
Wochenende, das auf dem Leben und der Kunst  
des großen Malers Vincent van Gogh basiert. Durch den  
Kurs verbessern wir unser Verstehen und Sprechen und  
werden auch die Esperanto-Grammatik üben. Du wirst  
Deinen Wortschatz in Bezug auf Kunst, Natur, Philosophie,  
aber auch Krankheit, Geographie, Astronomie und  
alltägliche Themen bereichern. Katalin Kováts wird uns  
unterrichten. Für die Teilnahme ist kein künstlerisches Talent  
erforderlich, auch nicht, um Van Gogh zu verstehen und  
zu mögen - dies wird im Laufe des Kurses geschehen! Wir  
werden uns auch mit dem aus historischer Sicht relevanten  
Zeitraum befassen, ebenso mit Werken anderer Maler.  
Bitte bring ein Bild deines Lieblingsgemäldes aus dem 19.  
Jahrhundert mit. Katalin unterrichtet auf den Sprachniveaus  
von B2 bis C1. Für alle anderen Esperanto-Sprecher findet  
ein Parallelkurs mit Sylvain Lelarge statt. Ort: Kulturladen  
St. Georg, Alexanderstr. 16, 20099 Hamburg, Deutschland.  
Kursgebühr: Freitag 15 € – Samstag 30 € – Sonntag 15 € /  
oder Komplettpreis für das Wochenende 50 ). Voranmeldung  
ist erforderlich bei Esperanto Hamburg e.V. Gerne  
unterstützen wir bei der Suche nach Übernachtungsmöglich-  
keiten. [info@esperanto-hamburg.de](mailto:info@esperanto-hamburg.de)



## Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

### Die Folge 50 möchte eine Lanze brechen für „fluter.“

Wer kennt nicht „fluter.“? Halt! Diese Frage müsste doch lauten: „Wer kennt Fluter (noch) nicht?“ – Ich fürchte, das sind einige unserer Leser, und das finde ich eigentlich schade. Die Inhalte sind leichte Lektüre und dennoch anregend zum Nach- und Mitdenken, was nicht nur jungen Lesern wärmstens empfohlen wird. „fluter.“ ist das Jugendmagazin der Bundeszentrale für politische Bildung und erscheint viermal im Jahr.

Die Eigenwerbung: „Ganz schön heftig ... alle drei Monate erscheint eine neue Ausgabe des gedruckten fluter-Magazins. Das Prinzip: Ein Thema pro Heft, das wir von allen Seiten für dich beleuchten. Und das Beste: das Abo ist kostenfrei ([www.fluter.de/heft-abo](http://www.fluter.de/heft-abo))!“

Ich lese das Magazin seit Jahren (kein Wunder – ich zähle inzwischen nicht mehr zum eigentlichen Zielpublikum), und gelegentlich kommt darin auch mal etwas in Esperanto vor, so wie im Ende 2019 erschienenen Heft zum Thema „Tiere“, das jeder dort selbst ansehen kann: [www.fluter.de/sites/default/files/magazines/pdf/fluter\\_no.72\\_magazin.pdf](http://www.fluter.de/sites/default/files/magazines/pdf/fluter_no.72_magazin.pdf).

Zugegeben: ich meine nicht die „Bildunterschrift“ der Seiten 26-27 mit ihrem „Hall of FAME“ – was ja gewiss nicht auf unsere FAME-fondajo abzielte, obwohl man das Denglische *fame* wie ein Akronym geschrieben hatte.

Vielmehr meinte ich die abgebildete Super-Mario-Echse **キャサリン**. Und die Magazinmacher haben dabei selbst bemerkt (wie wohl jeder aufmerksame Esperantist), dass die/der **Birdo** dem Namen nach eigentlich ein Vogel sein müsste, auch wenn er gar keine Flügel hat ...

Und dann gab's da noch eine Neuerscheinung mit Esperantoname: das Biomarktmagazin „**KREO**“ des Naturkostfachhandels, genauer: von *denn's Biomarkt*. Das Editorial des ersten Hefts nennt auch klar den Bezug des Titels auf Esperanto: „dies ist die erste Ausgabe von KREO (Esperanto für Ursprung) ... Wer sich mit Saatgut auseinandersetzt, für den wird der Begriff "Vielfalt" zum Kre(d)o.“ Dass die Rückseite mit ihrer Erklärung nicht so ganz richtig liegt, wurde der Redaktion freundlich mitgeteilt – mal sehen, ob das irgendeinen Niederschlag finden wird.

**Krejo** [kre:oj], Esperanto für Schöpfung. Titel dieses Magazins. Entlehnt der weitgehend vergessenen Sprache Esperanto, die 1887 als Universalsprache veröffentlicht wurde.



Eine weitere Bemerkung sei mir hier erlaubt, und zwar aus einem aktuellen Anlass:

Seit vielen Jahren bemühe ich mich ja um Beiträge für diese unsere Verbandszeitschrift, auf Anregung von Rudolf Fischer. Und fast ebenso lang versuche ich immer wieder, auch durch spitze und vielleicht provokante Bemerkungen ein Echo hervorzurufen – bei vielen anderen Presseerzeugnissen ist es ja ganz normal, dass sich Leser zu Wort melden – bei Esperanto schien das nicht der Fall zu sein.

Man mag wähnen, dass dies der minimalen Grundgesamtheit bewusst lesender Abonnenten geschuldet war; man kann auch (wieder einmal) von „*tote Hose*“ reden. So weit will ich aber gar nicht gehen. Reaktionen auf meine „geistigen Ergüsse“ in Esperanto aktuell erhielt ich sporadisch, jedoch nur in mündlicher Form und aus dem engeren Bekanntenkreis.

Doch jüngst kam doch in der Tat eine Leserreaktion (auf mein Gejammer à la „*keine Sau interessiert sich ...*“), und ich will sie hier nicht deshalb erwähnen, weil sie mir schmeichelte, sondern darum, weil dieser Abonnent unterstrich, dass ihm die Kosten für unser Heft nicht zu hoch erscheinen: „*Eins muss man sagen: Der Nutzen des Blattes ist höher als der Preis des Abos.*“ – ein sehr erfreuliches und positives Echo in Zeiten, da viele Blätter ihr Erscheinen auf Papier einstellen, auf pdf-Ausgaben ausweichen oder gar ganz aufhören!

Und zu guter Letzt (die Betonung liegt hier auf **gut**) will ich mich der Pressemitteilung des Deutschen Bibliotheksverbands dbv anschließen, der am 11.11.19 die Gleichbehandlung von Presseerzeugnissen, ganz gleich ob in gedruckter oder in digitaler Form, begrüßte:

Am 6.11.2019 beschloss der Deutsche Bundestag, die reduzierte Mehrwertsteuer auch für Online-Publikationen anzuwenden und zwar auch dann, wenn ein und dieselbe Publikation nicht einzeln, sondern gemeinsam mit weiteren Publikationen in gebündelter Form aus einer Datenbank heraus angeboten wird (was im Regierungsentwurf zunächst noch ausdrücklich ausgeschlossen war).

Dabei unterstrich der Bundesvorstandsvorsitzende: „*Sowohl analoge als digitale Medien prägen das heutige Leseverhalten. Bibliotheken erleben eine steigende Nachfrage nach elektronischen Büchern und Zeitschriften. Zugleich besteht weiterhin Bedarf nach Literatur in gedruckter Form.*“

Zuallerletzt bleibt mir nur noch die traurige Aufgabe, einen weiteren kurzen **Nachruf** zu formulieren: schon vor 15 Jahren verstarb unser Bibliotheksdirektor Pfarrer Adolf Burkhardt. Seine Gattin Grete Burkhardt blieb weiter mit unserer Bibliothek in freundschaftlicher Verbindung, und ging nun am 9.11.19 von uns. *Ŝi restu en paco eterna!*

Utho Maier

Triste, Utho Maier



# Medienecho

**Herzlichen Dank für zugesandte Artikel und Hinweise. Bitte geben Sie bei Mitteilungen einen eindeutig identifizierbaren Absender und einen sinnvollen Betreff an, damit sie nicht im Spam-Ordner landen.**

**Netzbeiträge, die nur über Angabe persönlicher Daten, per Passwort, kostenpflichtig oder nach Anmeldung zu lesen sind, werden in dieser Zusammenstellung nicht berücksichtigt.**

**Auf nicht im Netz erschienene Berichte, die aber vorliegen, wird hingewiesen. Diese können Interessenten gerne als Kopie zum persönlichen Gebrauch (nur per Netzpost) zugesandt werden. Anfragen an "medienecho@esperanto.de" - Bitte den jeweils genannten Betreff angeben.**

**10. November 2019**

**Sonntagsblatt für Steiermark**

**Über den NS-Märtyrer und Esperantisten Dr. Max Josef Metzger**

Sein Einsatz für Frieden und Einheit und ein an den evangelischen Bischof von Uppsala geschicktes Memorandum zur Gestaltung Deutschlands nach dem Kriegsende führten zu Verhaftung und Todesurteil. Aus dem Gefängnis hinterließ er mit seinen Gedichten ein beredtes Zeugnis. Eines seiner letzten Worte lautete: "Ich habe mein Leben Gott angeboten für den Frieden der Welt und die Einheit der Kirche.

[https://issuu.com/sonntagsblatt\\_stmk/docs/http\\_\\_\\_www.graz-seckau.eu\\_upload\\_so\\_d8134a7e4e3870?fr=sYWYzZTQzNDU5MQ](https://issuu.com/sonntagsblatt_stmk/docs/http___www.graz-seckau.eu_upload_so_d8134a7e4e3870?fr=sYWYzZTQzNDU5MQ)  
Wikipedia: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Max\\_Josef\\_Metzger](https://eo.wikipedia.org/wiki/Max_Josef_Metzger)

**6. November 2019**

**Harz-Kurier**

**Eine Liebesgeschichte auf Esperanto kostenpflichtig**

Song Jeong-ok und Harald Schicke erzählen im Interview mit unserer Zeitung von Ginseng, Herzberg und Korea.

<https://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article227562447/Eine-Liebesgeschichte-auf-Esperanto.html>

Eine Kopie zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netzpost zu: "medienecho@esperanto.de", Betreff: "2019-11-06\_TAZ\_liebesgeschichte"

**3. November 2019**

**Radio F.R.E.I.**

**Turingio Internacia**

**eine einstündige Radiosendung aus Erfurt**

[https://www.radio-frei.de/index.php?iid=1&ksubmit\\_show=sendung&kunixtime=1572807600](https://www.radio-frei.de/index.php?iid=1&ksubmit_show=sendung&kunixtime=1572807600)

**31. Oktober 2019**

**Von Haus zu Haus, Nr. 44, Denzlingen**

**Mit Esperanto von Gundelfingen bis Finnland**

„Mit Esperanto durch das Baltikum bis nach Finnland“ war der Titel eines Vortrages von Dr. Manfred Westermayer im Haus des Schwarzwaldvereins in Wildtal, der guten Zuspruch erhielt.

<https://de.calameo.com/read/003743820cd847ee8bf8f> (auf Seite 2 o. r.)

Eine Kopie zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netzpost zu: "medienecho@esperanto.de", Betreff: "2019-10-31 von Haus zu Haus"

**22. Oktober 2019**

**Capulcos**

bietet Esperanto-Aufkleber in der Größe 8 x 5 cm für 1,28 Euro an: [https://www.capulcosale.com/index.php?main\\_page=product\\_info&products\\_id=779746](https://www.capulcosale.com/index.php?main_page=product_info&products_id=779746)

**22. Oktober 2019**

**Die Oberbädische, Weiler Zeitung, Die Sprache, die die Welt verbindet**

Drei Tage in eine andere Sprachwelt abtauchen: Das haben am Wochenende um die 50 Esperanto-Sprecher in der Jugendherberge Lörrach getan. Mit Vorträgen und gemeinsamen Aktivitäten, nicht zu vergessen die Gespräche in der gemeinsam, weltweit gesprochenen Kunstsprache, erwartete die aus verschiedenen Ecken des Dreiländerecks angereisten Esperantisten von Freitag an ein dichtes Programm.

<https://www.verlagshaus-jaumann.de/inhalt.loerrach-die-sprache-die-die-welt-verbindet.723e2c6d-7af9-4d6c-af4e-22502831b0b8.html>

**21. Oktober 2019**

**Badische Zeitung mit Anmeldung**

45 Esperantosprecher aus Deutschland, Frankreich und der Schweiz trafen sich am vergangenen Wochenende in der Jugendherberge Lörrach.

<https://www.badische-zeitung.de/eine-sprache-die-weltweit-tueren-oeffnet>

**21. Oktober 2019**

**Esperanto, eine Sprache die Barrieren zwischen den Völkern überwinden sollte**

Zamenhof war Jude und hoffte, mit einer gemeinsamen Sprache für Russen, Juden, Deutsche und Polen Barrieren zwischen den Völkern überwinden zu können. Dafür schuf er eine Sprache mit sehr einfachen Regeln.

<https://www.sueddeutsche.de/politik/aktuelles-lexikon-esperanto-1.4649143>

**20. Oktober 2019**

**Express**

**Kennt er eigenen Minister nicht? Donald Trump blamiert sich mit peinlichem Tweet**

Oh, er kennt Esperanto?

<https://www.express.de/news/politik-und-wirtschaft/rnd/kennt-er-eigenen-minister-nicht-donald-trump-blamiert-sich-mit-peinlichem-tweet-33342404>

**Spiegel**

**mal wieder vertwittert:**

<https://www.spiegel.de/politik/ausland/donald-trump-schreibt-mark-esperanto-statt-mark-esper-a-1292453.html>

**web.de**

Donald und der Fluch der Buchstaben

<https://web.de/magazine/politik/us-praesident-donald-trump/mark-esperanto-donald-trump-fluch-buchstaben-34114206>

**merkur.de**

Mark Esperanto? Donald Trump löscht peinlichen Tweet, aber viel zu spät für das Netz

<https://www.merkur.de/politik/donald-trump-mark-esperanto-praesident-loescht-peinlichen-tweet-aber-schon-spaet-zr-13138039.html?cmp=defrss>

## Kiel ni venis al „ĈAR KEKSOj mojosas“



Ĉi-jare Pola Esperanto-junularo organizis sian aŭtunan renkontiĝon por novuloj ĈAR, samtempe kaj kune kun KEKSO de Germana Esperanto-Junularo, ĉe la germana-pola landlimo en Zgorzelec kaj Görlitz.

Pro la kombino de la eventoj ni nomis ĝin „ĈAR KEKSOj mojosas“ kaj kreis propran logotipon. Ĉiuj poartoprenantoj renkontiĝis meze de oktobro dum milda semajnfino en la turisma domo en la pola flanko de la tiel nomata Eŭropa-urbo. Dum la unua vespero ni interkonatiĝis, ludis, drinkis polan vodkon, manĝis picon kaj amuziĝis.

De la germana flanko venis per trajno Paul Würtz kaj Eva Otto, kaj per blabla-aŭto Michaela Stegmaier. Por Eva ĝi estis la unua Esperanto-evento. Ŝi venis el Lepsiko kaj eklernis Esperanton du monatojn antaŭ KEKSO. Ŝi jam bone komprenis la enhavon de interparoloj kaj povis formuli kelkajn frazojn en Esperanto.

De la pola flanko alvenis deko da junuloj per trajno kaj per propra aŭto ĝis tre malfrua horo, inter ili tri novuloj, kiuj unue aperis en IJK en Slovakio kaj poste ankaŭ en Arkones. En la sabata antaŭtagmezo ni estis dividitaj en etaj grupoj por malkovri la tutan urbon, ludante urboludon.







Ĉirkaŭ dudek lokojn ni devis trovi laŭ iliaj koordinatoj, kaj tie respondi al ne facilaj demandoj.

Tagmeze ĉiuj kuniĝis en restoracio, por poste ankoraŭ kune rigardi la urbon, inter alie kristnaskan domon, kie vi povas aĉeti figurojn kaj ornamaĵojn por la sankta festo dum la tuta jaro. Ni estis bonŝancaj havi lokulon, kiu gvidis nin Esperante kaj aldone invitis nin al sia loĝejo por tie denove ludi, babili kaj, tre grave, manĝi KEKSOjn.

Ĝis tre malfrue ni sidis kune, ĝis iam en la nokta malvarmo homoj unu post la alia remiĝis al nia gastejo.

Posttagmeze ankoraŭ okazis premiigo de la venkintoj de la urboludo kaj prezentadoj de prelegetoj pri diversaj temoj.

Kvizo pri KEKSOj, preparita de Roma, bone enplektis nian tre gravan pasion. En dimanĉo ni trankvile kunsidis, iris matenmanĝi, priparolis ontan kunlaboron inter GEJ kaj PEJ kaj devis adiaŭi baldaŭ, por reveturi al niaj hejmoj.

La germana grupeto iris tra la germana urboparto al la germana stacidomo de Görlitz kaj karavane reveturis al Dreseno, Lepsiko laŭ Brunsviko.



## Liebes Mitglied,

**D**as Jahr geht zu Ende, wir verbringen unsere Zeit im Kreis unserer Liebsten, manche backen Kekse, manche gehen mit Freunden wandern und einige von uns packen schon ihre Koffer für das JES in Karlów. Dort geht die Feierei weiter bis ins neue Jahr. Du bist von Freunden umgeben, nimmst an musikalischen, akademischen oder tänzerischen Programmpunkten teil, erkundest die Umgebung und genießt eine schöne Zeit. Das Organisationsteam des JES ist immer für dich da und versucht, dir alle Wünsche zu erfüllen, damit du diese Woche nie vergisst. Es freut sich aber auch über deine Unterstützung. Vielleicht willst du ja sogar lernen, wie man so ein großes Treffen auf die Beine stellt. Dann sprich Lars, David, Roma, Pjotr, oder den Rest des Teams an! Komm in unsere „Konstanta Komisiono pri Renkontiĝoj KKRen“ und mach mit bei der Vorbereitung des nächsten JES in Deutschland. Wenn du dich lieber in einem anderen Bereich engagieren möchtest, dann schau mal auf unserer Website vorbei, welche **Kommission** deine Interessen vertritt. Oder wende dich direkt an mich und frag nach ([www.esperanto.de/de/enhavo/gej/kommissionen](http://www.esperanto.de/de/enhavo/gej/kommissionen)).

Wenn das JES vorbei ist, möchten wir nicht, dass du ein Jahr lang ohne Aussicht auf Heilung, an einem „Postkongresa Sindromo“ leidest. Deswegen präsentieren wir dir in dieser Ausgabe einige Möglichkeiten, zu Esperanto-Treffen zu fahren. Da wären die KEKSOs, das IJF, PEKO, der **Deutsche Esperanto-Kongress**, für den wir ein **Projekt** für Fortgeschrittene Esperanto-Sprecher aus DEJ und PEJ planen und natürlich noch viele weitere Treffen auf [eventaservo.org](http://eventaservo.org) oder [eventoj.hu](http://eventoj.hu).

Als kleinen Vorgeschmack auf unsere Mitgliederversammlung beim JES, die in diesem Jahr von Lars und David geleitet wird, haben wir für dich den **Haushaltentwurf** für 2020 mit Erläuterungen von unserem Schatzmeister Lars. Die Einladung und Tagesordnung wurde in der letzten Ausgabe der kune (5/2019) veröffentlicht.

Wir freuen uns sehr, dass die DEJ in letzter Zeit Zuwachs bekommen hat, den du beim JES „beschnuppern“ kannst. Dazu gehören Eva Otto und Jan Raring der sich euch in dieser Ausgabe vorstellt und einen Bericht geschrieben haben. Hinzu kommen einige Eindrücke über das **KKPS** von Michael Vrazitulis. Du willst auch mal etwas in der kune veröffentlichen? Das geht ganz einfach, wenn du bis zum 15. jedes ungeraden Monats deinen Text an unser kune-Team sendest ([kune@esperanto.de](mailto:kune@esperanto.de)). Im nächsten Jahr kannst du dich auf eine Reihe Interviews mit Vorstandsmitgliedern und ehemaligen Vorstandsmitgliedern freuen, die dir erzählen werden, wie sie in den Vorstand gekommen sind, was sie in ihrer Amtszeit gemacht und dabei gelernt haben.

Zuletzt haben wir für dich ein Organigramm erstellt, was dir die Strukturen der DEJ und ihre Beziehungen zu anderen Organisationen auf einen Blick darstellt.

Jetzt wünsche ich dir ganz viel Spaß beim Lesen der kune und dir und deiner Familie ein schönes, friedliches und besinnliches Weihnachtsfest mit Kerzen, Musik, einem liebevoll geschmückten Baum und dem Geruch von frisch gebackenen Keksen. **Deine Michaela** ([michaela.stegmaier@esperanto.de](mailto:michaela.stegmaier@esperanto.de))






## Sekvontjare okazos printempa KEKSO

en Schwerte, inter la 13-a kaj 15-a de marto. Vidu nian novan logotipon (kreita de Jonny M) kaj legu la novan priskribon de KEKSO en nia retejo [esperanto.de/gej](http://esperanto.de/gej). Vi povas jam aliĝi. Ni antaŭĝojas vian ĉeeston!




## IJF, Internacia Junulara Festivalo 2020



okazos en Italio: sestaga festivalo dum Pasko 2020. GEJ, PEJ kaj IEJ havas interŝanĝprogramon, en kies kadro vi havas la ŝancon ricevi senkoston lokon dum tiu evento. Vi nur devos pagi vian vojaĝon. Kandidatiĝu ĝis fino de februaro! Pliaj informoj sekvas.



## PEKO: Printempa Esperanto-Kunveno




de **Verdaj Skoltoj** okazos de la 30-a de aprilo ĝis la 3-a de majo 2020 en Tilff, Belgio. Vidu <http://verdajskoltoj.net/peko-2020-programo/>. Valère +32 485 517 552; [info@verdajskoltoj.net](mailto:info@verdajskoltoj.net); Christine +49 1575 8038 115; [christine.duisburg@gmx.de](mailto:christine.duisburg@gmx.de)



## Trako projekto. Notu la daton: 29.5.-1.6.20

Dum German-Pola-Fervojista Esperanto-Kongreso en Frankfurt (Oder)/Stubice ni planas projekton pri kunlaboro inter generacioj, gvidado de asocioj kaj organizado de renkontiĝoj. Aliĝu ĝustatempe ĉe la estraro por ricevi subvenciojn de la german-pola junularfonduso. Pliaj informoj sekvas en nia novaĵletero.



## Jan Raring – per biciklo ĉirkaŭ la mondo

### Pri la aŭtoro

Mi estas Jan Raring. Mi naskiĝis en 1998 en Steinfurt, sed plenkreskiĝis en Waltrop, Germanio. Post la ricevo de la Realschul-diplomo en 2014 mi fariĝis interŝanĝa studento kaj vivis unu jaron en Ohio, Usono. En 2015 mi komencis mian unuan Esperanto-renkontiĝon (IJK en Wiesbaden). En 2018 mi, kun laŭdoj, ricevis mian abiturient-diplomon. Tuj poste mi ekbiciklis de mia hejmo orienten. Tiu vojaĝo daŭris preskaŭ 14 monatojn. Nun mi finfine denove estas hejme kaj staras je la komenco de studo da matematiko ĉe la universitato de Münster. Krom matematiko kaj biciklado mi okupigas min per lingvolernado, legado kaj komputilumado.

### Per biciklo ĉirkaŭ la mondo





**418 tagojn mi vagabondis tra sud-orienta Eŭropo, Turkio, Irano, UAE, Omano, Barato, Nepalo kaj sud-orienta Azio. Mi dormis preskaŭ ĉiun tagon en malsama loko, vidis 23 landojn kaj finfine biciklis 22.503 kilometrojn.**

**S**ed ekde la komenco. Post kelkaj semajnoj da planado, la 1-an de Julio 2018 mi adiaŭis miajn familianojn, geamikojn kaj najbarojn en Waltrop, sidiĝis sur la biciklon kaj ekis sud-orienten. Ĉu Hong Kong, Bangkok aŭ Singapuro – la celon mi ne fiksis. Al Hanojo, Vjetnamio mi finfine alvenis. “Nu, kiel estis?” – mia fratino min ŝerce demandis, kiam mi rulis sur la hejman korton, bone sciante, ke simple ne eblas konkludi 14 monatojn kaj pli ol 22.000 kilometrojn en manpleno da frazoj. Estas la amaso da renkontoj kun gastigemaj homoj, kiuj sen hezito donis al mi manĝon, tendumlokon, aŭ eĉ liton malplenan kiel la barata aŭtorikŝo-ŝoforo, kiu invitis min al vespermanĝo, nesciante, ke fakte estis mia naskiĝtago. Pli ĝenerale la manĝaĵoj: Sur mia telero troviĝis unu aŭ alia koleoptero aŭ tripaĵo, sed kion oni ne faras por ne ofendi sian gastiganton...

Mi tamen, krom du- aŭ trifoja malvarmumo, neniam serioze malsaniĝis, nek estis envolvita en trafik-akcidento, kio al mi preskaŭ egalas al miraklo. Ankaŭ la biciklo bone travivis la vojaĝon. La pneŭoj kelkfoje perdis sian aeron, sed tio estis ĉio.

Kiun efikon havas tiom longa periodo en soleco kaj fremdeco; tiom da travivaĵoj? Miaj geamikoj opinias, ke mi ŝajnas pli matura ol antaŭe. Mi mem ĉiam diras, ke mi fariĝis pli trankvila, sed miaj konatuloj devas rideti pri tio, ĉar mi ja jam antaŭe ne estis la plej laŭta, plej perturbema homo.

Sed mia mondrigardo ja iom ŝanĝiĝis. Vidinte la malriĉecon en la mondo, la por ni apenaŭ imageblajn viv-cirkonstancojn, kiuj estas la ĉiutaga realeco en certaj regionoj de la mondo, kaj la malliberecon, sperteban en landoj kun opresema registaro aŭ kulturo, la problemetoj niaj ne plu ŝajnas tiom gravaj. Impresis min ankaŭ, ke ofte la homoj en la plej malriĉaj landoj estas la plej ridemaj.


“Kio plej plaĉis al vi dum la vojaĝo?” – oni ofte demandas min. Komprenible malfacilas elekti unu aferon tian, sed certa estas, ke mi enamiĝis al la dezerto. La noktoj solaj en tuta silenteco sen ajna frapo de flugilo birda aŭ insekta, sen ia spiro de vento sub steloplana ĉielo – tiaj memoroj ankoraŭ plenigas min per feliĉo. Aŭ la nenombreblaj fojoj, ke mi estis invitita de tute fremdaj homoj. Tio okazis aparte ofte en Irano. Unu vesperon homoj en aŭto haltigis min demandante, ĉu mi dezirus tranokti ĉe ili. Mi akceptis, ili markis sian loĝejon sur mia mapo kaj foriris. Sur la vojo alia aŭto haltis kaj ankaŭ ili invitis min. Mi dankeme klarigis, ke mi jam havas lokon, sed ili insistis, ke ili almenaŭ eskortu min tra la trafiko al la urbo. En la urbo mi iris al la markita loko kaj viro tuj signis al mi eniri sian domon. Bone! Sed mi ja rimarkis, ke la homoj aspektas alie kaj evidentiĝis, ke ili tute ne rilatis al la homoj en la aŭto. En vero estis tria familio, kiu simple forprenis min de la strato!

En la fino, de Hanojo mi prenis aviadilon reen al Istanbuloj kaj daŭrigis Slovakien, kie ĉi-jare okazis Internacia Junulara Kongreso de TEJO. La lastajn esperantistojn mi renkontis en Budapeŝto, do estis granda ĝojo, ke jam antaŭ la renkontiĝo venis du esperantistoj kun siaj bicikloj al Rumanio, por akompani min kelkajn tagojn. Tio estis la lasta halto antaŭ ol reveni al mia hejmo. Kaj nun? Nun mi prioritatis miajn studojn (mensa laboro mankis al mi), sed la venontaj biciklo-vojaĝoj jam estas planataj!

**Michael Vrazitulis:**

## Pri KKPS kaj malaperantoj

**Klaĉ-Kunveno Post-Somera okazas preskaŭ ĉiujare en Nederlando, en semajnfino ĉirkaŭ Haloveno.**



**D**o, mi vizitis KKPS-on inter la 1-a kaj 3-a de novembro. Por tiuj, kiuj ne konas ĝin: Temas pri ĉiuaŭtuna eventeto, organizata de Nederlanda Esperanto-Junularo, kun surloka helpado de Verdaj Skoltoj.

Areto da homoj ni estis, kiuj renkontiĝis proksime al Bodegraven, malgranda urbo en ĉarme nenieca ĉirkaŭaĵo: „Tiu ĉi estas la plej holanda pejzaĝo, kiun vi iam ajn vidos.“ Iel tiel diris al ni Roĉjo, unu el la ĉefaranĝantoj, dum li tiuendrede en la pluveta posttagmezo nin veturigis aŭte de la stacio al la ejo. Li estis montranta per unu mano ekster la aŭtofenestron. Videblis malhelverdaj kampoj, plej fore ventelektrigiloj, disritme rotaciantaj kaj tie-tie siluetoj de biciklistoj. „Ja holanda, ĉu?“ mi pensis, kiam la aŭto iam haltis, kaj eliĝis krom Roĉjo du italaj geesperantistoj kaj mi. Estis apenaŭ la dudeka, kiam mi sidiĝis – akceptiĝinte, sentante malsaton, pro la ĵusa vojaĝo – por vespermanĝi. Pli malfrue alvenis kelkaj pliaj personoj. Certe estis belege revidi multajn vizaĝojn konatajn.



La unua vespero de tiu trankvila dumsemajnfina evento iam disfluigis post etrondaj babildadoj, kartludadoj, drinkumadoj.

Sabatmatene voĉoj vikle diskutantaj vekis min. Ili venis defore. Kelkaj homoj supozeble do jam estis matemanĝantaj sube en la salono. Iom bizare ja estas vekigi pro planlingvaj krioj, mi subite reflektis. Sed kial oni preferu kokokrion?

Post la matenmanĝo kunsidis kaj asembleis la anoj de NEJ. Verdire mi malmulte scias pri la preparolitaĵoj kaj deciditaĵoj, ĉar mi ne longe ĉeestis tion. Sed mi ja imagas, ke la nederlandajn samideanojn okupas ĉiuokaze granda kvanto da laboro, certe ankaŭ pro la planata realigo de la venontjara IJK en ilia lando.

Sekvis ekskurso al la proksime troviĝanta natura parko. La halovena kostuma „balo“ dum la vespero kompletigis la jam tradician distroprogramon de KKPS.

Por mi tiu estis fakte la dua tia evento partoprenita. Antaŭ du jaroj mi jam vizitis ĝin. Tiam, mi memoras, la dancejo kaj drinkejo estis plenaj dumlonge, preskaŭ ĝis la noktofin'. Ĉi-jare la kompare malgranda nombro de partoprenantoj igis la etoson pli trankviligema, kvazaŭgufuja. Sendube ankaŭ tio havis sian unikan ĉarmon.

Konsiderante tamen, ke estas la jaro 2019, kiam ĉi-somere en Lahtio, Finnlando, okazis denove historie malgranda Universala Kongreso, eble por ni indas, ke ni esploru la jam anekdote rimarkeblan, paŝon post paŝo gravigantan stagnacion aŭ eĉ malkreskadon de la esperantistaro. Kvankam promesemaj retbazitaj projektoj, kiel Amikumu aŭ la lingvokurso ĉe Duolingo parte prave altigis esperojn pri esperantigo de iaj novaj interretulaj amasoj, tiuj projektoj ŝajne ne sukcesis estigi ion plian ol efemerajn interesitojn pri la lingvo.

Kompreneble estus pesimismaĵo tro draste interpreti la nuntempajn realojn. Rimarkeblas tamen, ke ĝuste tiun zorgon pri malrapida formalkresko de nia lingvokomunumo antaŭ ne tro longe jam esprimis Grigorij Arosev en artikolo „La Esperanto-movado pereas“, publikigita fine de ĉi-pasinta julio en *Libera Folio*.

Dimanĉe, post la lasta tagmanĝo, kiel menciinda programero okazis ankoraŭ



trejnado pri varbado. Ĝin bonege gvidis konata italdevena aktivulo kun karakteristike laŭta voĉo. Verŝajne ja nur ĝuste tio, la ĝisdatigo kaj perfektigo de porEsperante varbaj aktivadoj, povas kuraci la problemon de stagnacio.

Iom poste ĉiuj adiaŭis unuj al la aliaj, disigis, forveturis. Espero por Esperantujo ja ne malabundas, mi pensis, kiam mi staris kun du samlingvanoj ĉe la stacidomo de Bodegraven, atendante la trajnon direktiĝontan reen al Utrecht. Unu el la du ja estis „freŝbakita“ flandra esperantoparolanto, eklerninta la lingvon antaŭ apenaŭ tri monatoj, laŭaserte.

Alveninte en Utrecht post duonhoreto da veturado, mi restis ankoraŭ kun unu alia juna esperantisto, nederlanda. Dum niaj lastaj hazardaj interparoloj li rakontis al mi, ke li aktivadas ĉe Vikipedio, kreante kaj redaktante artikolojn tie. Ekzistis, tiel li plurakontis, en la sepdekaj jaroj, iu greka esperantisto, Savas Tsiturides, kiu dum du jaroj kiel prezidanto estris TEJO-n. Sed nenie ŝajnas trovebli pli da informoj pri li ol tio. Supozeble li baldaŭ post prezidanteco kabeis. „Ĉu vi povas helpi min trovi pli da faktoj pri tiu viro?“, demandis la redaktemulo. „Certe“, mi respondis.

Malaperis ankaŭ li. Mi entrainiĝis denove por reveturi Germanien. Ĝis Frankfurto oni estis bezononta pli ol tri horojn. Komforte sidiĝinte, mi kontrolis la tujmesaĝejon ĉe Telegramo, kreitan por la ĵus finiĝinta evento.


Venontjare, iu skribas, KKPS okazos en la nordo de Danio, proksime de la urbo Ry. Malŝaltinte la poŝtelefonon mi fermis la okulojn kaj komencis duondormi.

Ja mankis iom da dormo, kutima afero dum kaj post evento Esperanta.

Kelkajn tagojn poste mi rememoras la peton de la juna nederlanda vikipediisto, kiun mi estis adiaŭinta ĉe la trajnstacia kajo.

En fejsbukan grupon de grekaj esperantistoj mi afiŝis demandon pri tiu mistera kabeinta TEJO-prezidanto de la sepdekaj jaroj. „Mi konis Savas“, iu maljuna samideano komente respondis, „ni estis eĉ najbaroj en Ateno. Li studis medicinon, fariĝis psikiatro. Sed poste iel mi perdis la kontakton. Ŝajne li ja simple malaperis“.

"Kien do, Gerda, kien?"





# Haushaltsplan 2020 der DEJ

## Liebe Mitglieder,


dies ist der Haushaltsplan der DEJ für das kommende Jahr 2020. Dieser Plan beinhaltet ein leichtes Minus, da viele Einnahmen schwer vorhersagbar sind, und Subventionen erst im nächsten Jahr zugesagt werden. Insgesamt ist dies also kein Grund zur Beunruhigung.

In den letzten Jahren habe ich hier das JES immer mit großem Verlust angegeben, da es bereits geplante Ausgaben gab, die Einnahmen aber noch nicht sicher waren. Dies hat zu einiger Verwirrung geführt, deshalb ist das JES diesmal mit 0€ eingetragen. Die KEKSOs sind teilweise als Werbeveranstaltungen konzipiert, weshalb sie weiterhin mit finanziellem Verlust (aber natürlich kulturellem Gewinn) eingeplant sind.

**Lars Hansen** – kasisto –  
*Lars.Hansen@esperanto.de*

Name	Einnahmen
<b>sonstige Einnahmen (Summe)</b>	<b>1500</b>
Spenden	0
Mitgliedsbeiträge	1500
Fördergelder (allgemein)	0
Projektsubventionen	0
JES 2019/20	0
JES 2020/21	0

Zinserträge	0
<b>Ausgaben (Summe)</b>	<b>-4010</b>
Treffen (Summe)	-550
JES 2019/20	0
Projektkosten	0
KEKSO 27 (Schwerze)	-150
KEKSO 28	-150
sonstige Treffen	-100
JES 2020/21	0
Esperanto-Kurse	-150
Werbeveranstaltungen	-300
<b>Geschäftskosten (Summe)</b>	<b>-3460</b>
Verwaltung	-1800
Versicherung	-260
Bankkosten	-300
Vorstandskosten	-300
Organisationstreffen	-750
sonstiges	-50
Fahrtkostensubventionen	0
<b>Gesamt</b>	<b>-2510</b>



**Du hast keine Lust, die Satzung zu lesen? Das kann ich verstehen! Trotzdem ist es vielleicht ganz nett, einen Überblick über die Strukturen des Vereins zu haben, in dem man Mitglied ist. Deswegen haben wir für dich ein Organigramm erstellt. Hier findest du alle wichtigen Infos über deine Mitgliedschaft, über die Zusammensetzung des Vorstands und über konstante Zusammenarbeit mit TEJO, PEJ, IEJ und dem DEB. Wenn du Fragen dazu hast, sende sie an den Vorstand, wir beantworten sie gerne ([gef.fe@esperanto.de](mailto:gef.fe@esperanto.de))**

# Kalendaro

## Decembro 2019

**20-22: Semajnfino kun opero** en Prago, Ĉeĥio. Venu kun ni spekti operon en Nacia Teatro en Prago, kiu estas kantata en Esperanto, ĝui antaŭkristnaskan etoson, renkonti amikojn... Sabate la 21-an de decembro 2019 je la 20-a horo en la Nacia Teatro de Ĉeĥio estos prezentita la opero *Sternenhoch*, kantata en Esperanto (kun ĉeĥaj kaj anglaj subtekstoj). Organizas: E-mental'. Retadreso: [e-mentalprago@seznam.cz](mailto:e-mentalprago@seznam.cz). Ĝis la 26-a de marto 2020 vi povas rigardi la tutan operon kun germanaj subtitoloj ĉe: <https://operavision.eu/de/bibliothek/auffuehrungen/opern/sternenhoch-national-theatre-prague#>

**27. dec - 03. jan: 11-a Junulara Esperanto-Semajno, JES** en Karlów, Pollando. JES estas unu el la plej grandaj Esperanto-aranĝoj de la junularo. Ĉiujare ĝi okazas ĉirkaŭ novjaro, dum unu tuta semajno, kutime en Germanio aŭ Pollando. La 11-an JES-on organizas Polska Młodzież Esperancka, Pola Esperanto-Junularo (PEJ). Retadreso: [jes@pej.pl](mailto:jes@pej.pl)

**27. dec - 03. jan: 18-a Novjara Renkontiĝo (NR)** en Wiesbaden, Germanio. Kutime ĉ. 150-200 gastoj, inter ili sesdedo da infanoj kaj junuloj. Multaj prelegoj, kultura programo. Apartaj programeroj por junuloj sub la nomo "Novjara Internacia Semajno" (NIS). Konversacia rondo kaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj. Organizas: Lu Wunsch-Rolshoven, Wicléfstr. 9, 10551 Berlin, Germanio. Retadreso: [lu.esperantoland@gmx.de](mailto:lu.esperantoland@gmx.de)

**28. Esperanta Silvestro** en Česká Třebová, Ĉeĥio. Tradicia aranĝo kun kultura kaj amuza programoj. Komenco je la 19-a horo en la restoracio Národní dům (Nacia domo), adreso: ul. Kozlovská 565. ATENTU! - ĉi-jare ŝanĝiĝis la ĉefa organizanto! Kontakto: Ladislav Kovář, [kovar.lad@email.cz](mailto:kovar.lad@email.cz)

**28. dec - 03. jan: LUMINESK'** – la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio en Nördlingen/Germanio. Demandoj ĉe Andreas Diemel: [demandoj@luminesk.de](mailto:demandoj@luminesk.de) aŭ telefone +49 203 2964 877. Ni petas atenti, ke ĉi-jare LUMINESK' daŭras nur ses noktojn, pro organizaj kialoj flanke de la domo.

## Januaro 2020

**18: Zamenhof-Festo** en Hamburgo, Germanio. 14:30 h en salono de „Stadtteilhaus Horner Freiheit“, Am Gojenboom 46, 22111 Hamburg, ĉe la U2/U4-haltejo „Horner Rennbahn“ tuj apud la Esperanto-arbo. Kotizo de 10 € enhavos (preskaŭ) senĉesan kafon/teon kaj kukon. Festprelego de la prezidanto Jürgen Wulff. „Kaŝi“ prezentos sian belegan voĉon. Ralph Glomp sursceniĝos spektaklon de Anton Ĉeĥov, kiu naskiĝis nur kelkajn semajnojn post Zamenhof en januaro 1860 – do ambaŭ nun festos la 160-an naskiĝdatrevenon. Kontakto: <https://esperanto-hamburg.de/kontakt/>; [info@esperanto-hamburg.de](mailto:info@esperanto-hamburg.de).

**18: Inaŭguro de Monda Ekspozicio Teo, Amo kaj Mondo** en Svitavy, Ĉeĥio, en Esperanto-muzeo Svitavy. Rete: <http://eksvitavy.weebly.com/>

## Februaro 2020

**15-22: 27-a E-Korusa Staĝo ĉe Pireneoj** en La BASTIDE/Hers (FR-09600), Francio. Zdravka BOJĈEVA denove korusestro

diversnacion (ankaŭ diversnivelan) aron da (ne-)E-scipovantaj gekorusanoj en diversepoka & diversstila E-reperuaro (originala kaj tradukita). Ni ĉiutage kantos 5 horojn kaj povos plie turismi, debati, ludi, lerni E-on laŭplaĉe, ev. skii kaj krome pluraj partoprenantoj ankaŭ folkmuzikemaj alportos siajn instrumentojn por ev. ludi kun dancigemaj lokuloj. Organizas: Jorgos ESPERANTO - TutPEKO - Mirevia - Le Village - FR - 11 420 - LAFAGE, Francio. Rete: [esperanto.ariege@free.fr](mailto:esperanto.ariege@free.fr)

## Marto 2020

**06-13: Bibliaj Tagoj** en Worms, Germanio. La Bibliajn Tagojn ofertas "Esperanto-Liga für Christen in Deutschland", la germana sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia. Ĉiu, kiun interesas kristanismo, estas bonvena. Ni diskutas, kantas, deservas, ĉio en ekumena etoso. Posttagmeze ekskursoj al Wiesbaden. Organizas: Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-48356 Nordwalde, Germanio. Rete: [fischru@uni-muenster.de](mailto:fischru@uni-muenster.de)

## Aprilo 2020

**06-13: 36-a PSI en Wittenberg, Germanio.** Granda internacia renkontiĝo por la tuta familio dum unu semajno ĉirkaŭ pasko. Ĝi okazos en la moderna junulargastejo Wittenberg, kiu estas parto de la historia kastela komplekso kaj monda heredaĵo; tuj apude de la preĝejo kun la Lutera teza pordo. Dum la semajno ni havos prelegojn, Esperanto-kursojn, sportajn aktivaĵojn, diversajn manlaborojn, ekskursojn kaj koncertojn. Inf.: Ralf kaj Zoja Haumer, rete: [ralf.haumer@esperanto.de](mailto:ralf.haumer@esperanto.de). Pliaj detaloj troveblas ĉe <https://psi.esperanto.de>, tie ankaŭ eblas la elektronika aliĝo.

**17-25: PRINTEMPaS** en Baugé, Francio. Intensaj kursoj kun Przemek Wierzbowski el Bjalistoko, Marion Quenut kaj Christophe Chazarein el Tuluzo. En la fino eblas KER-ekzameniĝi! (B1, B2, C1.) Organizas: Esperanto-Kastelo Greziljono, MCE Grésillon, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio. Rete: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

**28: Kultura Tago en Lunteren, Nederlando.** Temo: Faktoj kaj Fantazioj, prelego: Federico Gobbo, kvizo: Bert de Wit, koncerto: Kajto. Organizas: Esperanto Nederland, Arubastraat 12, 9715 RW Groningen, Nederlando. Rete: [sekretario@esperanto-nederland.nl](mailto:sekretario@esperanto-nederland.nl)

## Majo 2020

**15-17: Hamburgo, Germanio:** Instru-semajnfino – Arto-ŝoko, Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge, rigardu la paĝon 22 de tiu ĉi numero, resp. rete: [info@esperanto-hamburg.de](mailto:info@esperanto-hamburg.de)

**20-24: 61-a BARO** en Hameln, apud Hannover, Germanio. Multaj venas kun siaj infanoj. Ni kuiras mem, babilas, ludas, festas, eluzas la eblojn de la granda herbejo kaj povas fari lignan fajron. Pliaj informoj: <http://krokodilo.de/baro/baro.php>

**29 maj-01 jun: Transponta Esperanto-Kongreso** en Frankurt (Oder), Germanio kaj Slubice, Pollando. Dum la pentekostaj tagoj de 2020 Pola Esperanto-Asocio kune kun Germana Esperanto-Asocio okazigos komunan kongreson en la limurboj Frankurt (Oder) kaj Slubice. Kune kaj samloke kongresos Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Dum la unuaj tagoj la kongreso havos komunan programon por ĉiuj tri partneroj. Organizas: Pola Esperanto-Asocio kaj Germana Esperanto-Asocio. Rete: <https://www.esperanto.de/eo/enhavo/transponta-esperanto-kongreso-2020>; [gek@esperanto.de](mailto:gek@esperanto.de)

# Aliĝilo

Seblas plenu la retan aliĝilon ĉe: <http://kongreso.esperanto.it>  
aŭ sendu tiun ĉi al: F.E.I., via E. Villorresi 38, 20143 Milano.

Persona Nomo \_\_\_\_\_

Familia Nomo \_\_\_\_\_  M  F

Adreso \_\_\_\_\_

Urbo \_\_\_\_\_

Poŝtkodo \_\_\_\_\_ Ŝtato \_\_\_\_\_

Retadreso \_\_\_\_\_

Hejma telefono \_\_\_\_\_

Portebla telefono \_\_\_\_\_

Naskiĝdato \_\_\_\_\_

Naskiĝloko \_\_\_\_\_

Mi pagis la sumon de \_\_\_\_\_ € laŭ jena maniero:  
 FEI-Banko  
 UEA-Konto (vidu la detalojn malantaŭe, sube)

Dato \_\_\_\_\_ Subskribo \_\_\_\_\_

## Kotizoj

Kategorio	plena <sup>2</sup>	rabattita <sup>3</sup>
1 <sup>a</sup> periodo, ĝis la 31/01/2020	70,00	35,00
2 <sup>a</sup> periodo, ĝis la 31/05/2020	90,00	45,00
3 <sup>a</sup> periodo, ĝis la 31/06/2020	110,00	55,00
4 <sup>a</sup> periodo, surloke	120,00	60,00
Jumuloj inter 13 kaj 25 jaroj <sup>1</sup>	10,00	10,00
Taga kotizo	20,00	20,00

<sup>1</sup> **Junuloj 13-25:** naskiĝinta post la 01/01/1995 kaj antaŭ la 31/12/2007

<sup>2</sup> **Kategorio Plena:** italo kaj italiano, se membro de IEF por 2020 (se nemembro, devas plupagi la koncernan membro-kotizon).

<sup>3</sup> **Kategorio Rabatta:** eksterlandano (neloĝanta en Italo), familiano de kongresano kaj mem membro de IEF, jumulo (naskiĝinta antaŭ la 31/12/1994 kaj post la 01/01/1990), handikapulo.

**Kategorio senkosta:** jumulo (naskiĝinta post la 01/01/2008) kaj femalhavbla akompananto de handikapuloj.



## Organiza komitato

Michela Lipari – kunordiganto  
Laura Brazzabeni – loĝiga servo  
Ugo Tonini – kasiso  
Riccardo Lamperti – programo  
Michele Guerriero – ekskursoj

## Por pli da informoj

<http://kongreso.esperanto.it>  
[kongreso@esperanto.it](mailto:kongreso@esperanto.it)



Fotoj de Pmuccio2007@flickr/pjshQzq (CC BY-NC-ND), Dr Bob Hall@flickr/patzsPX (CC BY), bertolini\_francesco @flickr/pjxMmG6 (CC BY-NC-ND), lacAssisi - Ufficio Turismo.



Patrocino della

87-A  
ITALIA  
KONGRESO  
DE ESPERANTO



«Sankta Francisko kaj la prediko  
al la birdoj: komunikado inter  
malsamuloj kiel vojo al paco»

ASSISI, 22-29 AGOSTO 2020